

Invitilo al programo de Esperantista klubo Brno

Ni kore invitas vin al sekva programo de Esperantista klubo Brno

Temo

Amuzu, lernu kaj ridu

Preparos: Josef Vojáček

La programo enhavas kvin erojn:

1. Kreu novajn vortojn
2. Kiuj numeroj anstataŭos demandsignojn?
3. Divenu!
4. Malbona elekto
5. Ludu per homonimoj!

La unua estas fakte lingva ekzerco por diveni literojn de la kaŝfrazo, la dua bezonas iom da cerbumado por solvi matematikan taskon. La tria estas du amuzaj enigmoj. Se vi ne scios la solvon, vi poste tamen trovos ĝin. La kvara estas kurta rakonto, el kiu vi ekscios, kiu kion malbone elektis. Kaj la lasta estas ludo kaj amuzo per homonimoj..

Lingvo: Esperanto

Kiam: la 27-an de oktobro 2020 je la 18-a h.

Kie: La renkontiĝo okazos rete per programo Skype (Skajpo). Se vi ankoraŭ na havas ĝin, mi petas vin instali ĝin. Oni povas elŝuti la programon el retejo <https://www.skype.com/cs/get-skype/>. Vi povas uzi ĝin per komputilo, tabletkomputilo kaj saĝpoŝtelefono (Android kaj iPhone). La sistemo funkcias ankaŭ per retumilo (Edge kaj Chrome), sed ni rekomendas uzi programon.

Ni rekomendas, ke vi uzu aŭskutilojn kun mikrofono por preventi eĥon. Sed ne estas bezonata, vi povas uzi mikrofono en via portebla komputilo (notebook).

Mi sendos ligilon por la renkontiĝo per retpoŝto marde.

Ĉar la renkontiĝo okazos rete, povas veni ankaŭ esperantistoj el fremdaj landoj. Ni vidos.

La laborfolio: Dum la unua parto vi plenumos taskojn en laborfolio. Mi sendos la laborfolion al vi marde antaŭ la renkontiĝo kune kun ligilo por la renkontiĝo. Vi povas presi la folion kaj plenigi permane aŭ plenigi en komputilo (la folio estos en formoj docx kaj odt). Se vi ne povas presi hejme, sed vi povas presi en via laborejo kaj vi volas presitan laborfolion, skribu al mi kaj mi sendos ĝin al vi pli frue, por ke vi povus presi ĝin en la laborejo. Bedaŭrinde pro la epidemio ne eblas disdoni al vi presitan formon. Sed ne estas bezonate havi presitan laborfolion. Vi povos skribi sur vian blankan paperon aŭ plenigi taskojn en komputilo.



Nia prokramo en novembro:

la 3-an

Kiel hejme registri prelegojn – Milan Kolka

la 10-an

Kiel hejme registri prelegojn – Milan Kolka

la 17-an

ŝtata festo, renkontiĝo ne okazos

la 24-an

Kiel ni travivis novembron 1989. Mi petas vin ĉiujn, ke vi preparu rakonton, kiel vi travivis Veluran revolucion 1989.



Pozvánky Vám chodí, protože jste členy klubu nebo příznivci, kteří souhlasili se zasíláním pozvánek. Souhlas můžete kdykoliv odvolat, stačí to napsat v odpovědi na tento e-mail.

Program klubu můžete též zjistit:

- na našich webových stránkách (<http://www.esperantobrna.cz/malnova/program.htm>),
- na naší stránce na Facebooku (<https://www.facebook.com/esperantobrna/>)
- a na Eventa servo (https://eventaservo.org/o/EO_Brna)

Milan Kolka

vicprezidanto